N. N. 01,

Baldaŭ sopirata tag'

tradukita de Joachim Gießner

Baldaŭ sopirata tag',
Nikola' kun sia ag'.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola'.

Ŝuon mi pretigos ja,
Ĝin plenigos Nikola'.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola'.

Ofte nokte sonĝas mi,
Kion eble donos li.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola'.

Frue mi rigardos, ĉu
Estos io en la ŝu'.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola'.

Nikola', mi dankas vin,
Ĉar vi tre ĝojigis min.
Ĝoju, ĝoju, traleralera,
Baldaŭ venos Nikola'.
Nun jam venis Nikola'.

Traduko de la Germana poemo "Das Nikolauslied" de N. N. 01 en Esperanton de Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-93-1224 (2012-10-10 22:50:59)

Pri la tradukinto vidu la retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Giessner`. *Kolekto de kanto-tradukoj troviĝas en* `http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html`.

N. N. 01,

La Nikolao-kanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Gajaj estu ĉiuj ni,
ĝoju ni pri nia Di'!
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Baldaŭ venos Nikola'!

Dum la nokto venos li,
la teleron metas mi.
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Baldaŭ venos Nikola'!

Kaj dormante sonĝas mi:
Dolĉajn aĵojn donas li.
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Venas Sankta Nikola'!

Ekstarinte vidas mi,)
ke jam venis tiu ĉi.
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Venis Sankta Nikola'!

Ĉiuj devas danki lin,
ĉar li regalegis nin.
Ĝoju, ĝoju, tralala-lala!
Venis Sankta Nikola'!

Traduko de la Germana poemo "Das Nikolauslied" de N. N. 01 en Esperanton de Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-93-189 (2003-12-10 22:20:06)